

# IP

## Informilo *por* Interlingvistoj

n-ro 110 (1/2020) ◆ 29-a jaro (tria serio) ◆ ISSN 1385-2191

*Eldonas: Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de  
la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)*

[www.esperantic.org](http://www.esperantic.org) [www.facebook.com/esperantic](http://www.facebook.com/esperantic) @esperanticsf @esfacademic

### ENHAVO

#### Bonvenon 3

#### Venontaj eventoj 4

Brita Lingvopolitiko Post Briteliro (UKLPAB)	4
Nitobe-Simpozio: Lingva diverseco kaj daŭripova evoluigo	5
Reta Esperanto-kurso por verkemuloj	6
Kurso por komencantoj ĉe la Universitato de Parizo	6
Esperanto por komencantoj ĉe la Universitato de Liverpolo, Anglio	6
Kurso de Esperanto en la Universitato UNED, Hispanio	6
Esperanto ĉe la Universitato Stanford, Kalifornio	6

#### Raportoj 7

<i>Militrakonto</i> ĉe konferenco en Talino	7
Interlingvistika sesio kun instruista trejnado	9
5-a Internacia Konferenco pri Aplika Lingvistiko	9
90-jara jubileo de la Esperanto-muzeo	10
Das Ende von Babel?	10
Parolado de François Lo Jacomo ĉe Unesko	10
Internacia konferenco en Perugia	10
Esperanto fariĝas protektita heredaĵo de Kroatio	11

#### Libroj 12

Davide Astori, <i>Due passi in Esperantujo – Promenadeto en Esperantujo</i>	12
Carlos Casares (trad. Suso Moinhos), <i>Vundita vento</i>	12

Bill Chapman, <i>The Early History of Esperanto in the United Kingdom</i>	13
André Cherpillod, <i>Vortaro de la mitoj kaj mitologioj</i>	13
François Grin (red.), <i>Mobility and Inclusion in Multilingual Europe: The MIME Vademecum</i>	13
Norman Lebrecht, <i>Genius and Anxiety: How Jews Changed the World 1847–1947</i>	14
Carlo Minnaja (red. Davide Astori), <i>Introduzione alla letteratura esperanto</i>	14
Gonçalo Neves, Bernhard Pabst, <i>Historia vortaro de Esperanto</i>	14
Juan Régulo Pérez k.a., <i>Pri adopto kaj Omaço</i>	15
L. L. Zamenhof, <i>Gramatiko de la jida lingvo: Provo de gramatiko de la novjuda lingvo (de la ĵargono)</i>	15
Sabine Fiedler, Cyril Robert Brosch, <i>Der Erasmus-Studienaufenthalt – Europäische Sprachenvielfalt oder Englisch als Lingua franca?</i>	15
Jarlibro 2019 de GIL	16
Esperantigo de <i>Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese</i>	18
<i>La gastlibro de Casa Fontanalba</i> , de Clarence Bicknell	19

## Artikoloj 20

Eckhard Bick, “Aŭtomataj generado kaj semantika gradigo de Esperanto-frazoj en instruada kunteksto”	20
Renato Corsetti, “UN 75-jariĝas: Esperanto bezonas Unuiĝintajn Naciojn, sed Unuiĝintaj Nacioj bezonas esperantistojn”	20
Nino Kirvalidze, “Novaj defioj de angliĝo en la kunteksto de la tutmondiĝo de la 21-a jarcento kaj ilia influo al supera edukado”	20
Brigid O’Keeffe, “Internacia lingvo por imperio de la homaro: L. L. Zamenhof kaj la imperiaj rusaj originoj de Esperanto”	21
Alexander Rubel, “Quo vadis Altertumswissenschaft? La rego de fremdaj lingvoj kaj la estonteco de klasikaj studoj”	21

## Disertacioj 22

Peter Sheehy, <i>La (trans)nacia teatro de Esperanto: surscenigi politikon, kulturon kaj komunumon en la internacia lingvo</i>	22
Literatura disertacio en la keĉua	22

## Diversaj 23

Kial subteni ESF?	23
Stipendio ESF ĉe la Universitato de Masaĉuseco	23
Esperanto kaj Internaciismo, ĉ. 1880-aj – 1930	24
Je la 70-jariĝo de ILEI	24
Finance subtenata doktoriĝo (Ph.D.) en la Universitato de Ulstero, Nordirlando: La plurlingva registaro	24
Muzeo Planet Word	24
Mapo pri lingva diverseco en Novjorko	24
Graveco de Esperanto-denaskuloj por la priskribo de Esperanto	25
Korekto pri “Aliro al Esperanto tra la literaturo”	25

## Stipendioj de ESF 26

# BONVENON

... al la unua *Informilo por Interlingvistoj* de nova jardeko, kun nova redaktoro. Multan dankon al Humphrey Tonkin, Ĵenja Amis kaj aliaj pro ilia redakcia laboro ĉe pasintaj numeroj, kaj al Angela Tellier pro ŝia helpo pri la nuna. Mi iom freŝigis la aspekton: espereble vi trovos la kajeron facile foliumebla, sed komentoj ĉiam bonvenas.

En la pasinteco ni havis iom da fleksebleco en nia eldonritmo, sed ekde nun ni strebos eldoni kvarfoje ĉiujare: je la fino de januaro, aprilo, julio kaj oktobro. Se vi deziras sendi informojn, la limdato por tio estos la lasta tago de la antaŭa monato; do por la dua kajero de 2020, bonvolu sendi ne pli malfrue ol la 31-a de marto.

IPI dependas de kontribuoj de siaj legantoj. Ĝi estas taŭga loko por anonci konferencojn, kursojn kaj similaj kunvenojn; por peti referaĵojn por tiaj okazaĵoj; por raportoj pri lastatempaj eventoj; por prezenti detalojn aŭ recenzojn pri novaj libroj aŭ artikoloj kun lingva temo; kaj por ĝenerale disvastigi novaĵojn pri aferoj sur la interlingvistika kampo. Vi povas sendi materialon aŭ en Esperanto aŭ en la angla – ambaŭ, se vi povas – per retroŝta mesaĝo al [ipi@esperantic.org](mailto:ipi@esperantic.org).

*Simon Davies*

# VENONTAJ EVENTOJ

## Brita Lingvopolitiko Post Briteliro (UKLPAB)

Bristolo, Anglio: 9 julio 2020

**peto pri referaĵoj – limdato: 11 februaro 2020**

<https://sites.google.com/view/uklpab/2020>

Brita Lingvopolitiko Post Briteliro (UK Language Policy After Brexit, UKLPAB) ekvivis en 2016 ĉe la Universitato Sheffield Hallam, nur kelkajn monatojn post la britelira referendumo, por taksu la situacion kaj konsideri eblajn efikojn sur lingvopolitiko ĉirkaŭ Britio. En postaj jaroj, prezentoj enfokusigis la detalajn efikojn de Briteliro sur tia politiko.

Ni ĝojas daŭrigi tiun sukcesan kaj senpagan serion da konferencoj en 2020, kiam fakte je la unua fojo okazos la konferenco *post* Briteliro!

Ĉiujare, UKLPAB-on gastigas malsama nacio de la Unuiĝinta Reĝlando. En 2019 gastigis Nordirlando [<https://sites.google.com/view/uklpab/2019>].

En 2020 UKLPAB venas al Anglio, specife al la Universitato de la Okcidento de Anglio (UWE), Bristolo. La loka komitatestro estos D-ino Charlotte Selleck, Supera Lekciisto pri Lingvistiko. Ni dankas Multilingual Matters kaj la UWE-Fakultato pri Artoj, Kreemaj Industrioj kaj Edukado pro ilia malavara subteno, ke UKLPAB estu senpaga por prezentantoj kaj ĉeestantoj.

Ĉiujare ni invitas ankaŭ ĉefpreleganton de la antaŭa gastiganta nacio. En 2020 la ĉefpreleganto estos Philip McDermott, Supera Lekciisto en la Fako de Aplikaj Sociaj kaj Politikaj Sciencoj ĉe la Universitato de Ulstero. Lia prelego havas la titolon “Lingvo, potenco kaj identecopolitiko: daŭraj defioj por la hodiaŭa Eŭropo”.

Nia temo por 2020 estos “Oficiala kontraŭ neoficiala lingvopolitiko”. Nian peton de referaĵoj, kiel ankaŭ la resumon de la ĉefprelego de Philip, vi trovos ĉe la retadreso ĉi-supre. Bonvolu tien iri aŭ por sendi vian resumon aŭ por aliĝi kiel ĉeestanto (ambaŭ estas senpagaj).

Diskonigu! Ni esperas vidi vin en Bristolo!

## Nitobe-Simpozio: Lingva diverseco kaj daŭripova evoluigo

Montrealo, Kanado: 8–10 aŭgusto 2020

Esperantic Studies Foundation (ESF), kunlabore kun la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED), planas organizi sian venontan Nitobe-Simpozion de la 8-a ĝis la 10-a de aŭgusto ĉe la Universitato de Montrealo. La laboraj lingvoj de tiu ĉi aranĝo estos la angla, franca kaj Esperanto.

La Simpozioj Nitobe, nomataj honore al la japana internaciisto kaj diplomato Nitobe Inazo, kiu estis Vica Ĝenerala Sekretario kun respondeco pri kulturaj aferoj en la fruaj jaroj de la Ligo de Nacioj, estas organizataj ĉiujn kelkajn jarojn en diversaj mondopartoj. Simpozioj okazis tra la jaroj en urboj kiel ekzemple Prago, Berlino, Vilno, Tokio, Pekino kaj Rejkjaviko.

La simpozio de 2020 markos la 75-an jubileon de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝia strebado konservi la pacon, fortigi homajn rajtojn, kaj antaŭenigi daŭripovan evoluigon, en multlingva mondo. Sub la ĝenerala titolo “Lingva diverseco kaj daŭripova evoluigo” ĝi esploros tri ĉefajn temojn:

- ◆ Lingvo kaj la Celoj por Daŭripova Evoluigo
- ◆ Multlingvaj informadaj kaj komunikaj teknologioj en daŭripova evoluigo
- ◆ Desuba multlingvismo kaj la defioj de daŭripova evoluigo

Ni invitas ĉiujn fakulojn, kiuj interesiĝas pri lingvopolitiko, UN-studoj, evoluigaj studoj, komunikaj teknologioj kaj rilataj temoj, sendi al ni esprimojn de interesiĝo pri partopreno en la Simpozio kaj kontribuado al tiuj ĉi kaj rilataj temoj. Bonvolu mallonge priskribi, kiel vi povus kontribui, kaj kiujn ĉefajn interesojn vi havas.

La simpozio limiĝos al proksimume kvindek invititoj el la tuta mondo. La programo enhavos ĉefparoladojn, podiajn diskutojn kaj rondajn tablojn. La simpozio ne havos aliĝkotizon, sed partoprenantoj respondecos pri la propraj kostoj de vojaĝado kaj restado.

Bonvolu sendi viajn proponojn al [mtfettes@sfu.ca](mailto:mtfettes@sfu.ca) kaj [tonkin@hartford.edu](mailto:tonkin@hartford.edu), prefere ĝis la 15-a de marto, 2020.

*Mark Fettes*, Simon Fraser University, Vancouver, Kanado  
*Humphrey Tonkin*, University of Hartford, Connecticut, Usono

## Reta Esperanto-kurso por verkemuloj

decembro 2019 – aprilo 2020

<https://docs.google.com/document/d/1JvimMeNI-nc3VJhi44f6NjzbDuaZvepiVRI0BYdEW5c/preview>

5-monata internacia kurso, en Interreto, kun instruistino kaj parolado, ĉe la Jagelona Universitato, Krakovo, Pollando.

## Kurso por komencantoj ĉe la Universitato de Parizo

ekde 20 januaro 2020

<https://edukado.net/ext/kursejo?kinfo=27111>

Libervola, semestro-longa, universitat-nivela, sub gvido de Christopher Gledhill.

## Esperanto por komencantoj ĉe la Universitato de Liverpolo, Anglio

5 februaro – 2 maio 2020

<https://payments.liv.ac.uk/conferences-and-events/continuing-education/languages/esperanto/ce-esperanto-for-beginners-wednesday-7-830pm>

Dekdusemajna kurso por komencantoj aŭ homoj kun tre limigita scio de la lingvo. Inkluzivas Esperanto-promenon, sabaton la 2-an de majo. Registriĝu antaŭ 19 februaro 2020.

## Kurso de Esperanto en la Universitato UNED, Hispanio

[https://portal.uned.es/portal/page?\\_pageid=93,56804237&\\_dad=portal&\\_schema=PORTAL](https://portal.uned.es/portal/page?_pageid=93,56804237&_dad=portal&_schema=PORTAL)

La Universitata Neĉeesta Centro pri Lingvoj (CUID) de la Nacia Universitato de Neĉeesta Edukado (UNED) anoncis kurson de Esperanto je nivelo A2.

## Esperanto ĉe la Universitato Stanford, Kalifornio

<http://esperanto.org/stanford/>

Klasoj estas senpagaj kaj malfermitaj, ĉiun jaŭdan vesperon en la akademia jaro.

## *Militrakonto* ĉe konferenco en Talino

26–29 junio 2019

Danke al la subteno de Esperantic Studies Foundation, la pasintan junion ni organizis tutan sesion pri Esperanto kaj la Dua Mondmilito en la kadro de la jara kunveno de Internacia Asocio pri Kultura Historio.

Konkrete, temis pri la jena sesio: “Preter la naciaj institucioj kaj imperiaj vizioj de la Dua Mondmilito”. Ĝi okazis la 27-an de junio inter la 11.00h kaj la 13.00h en la ĉambro 342 de la Universitato de Talino, Estonio. Ĝi konsistis el kvar prezentoj:

- ◆ Javier Alcalde, “Esperantistoj kontraŭ faŝismo en la Hispana Enlanda Milito”.
- ◆ Joseph Essertier, “La Esperanto-movado en la japana ‘totala milito’ de 1931–1945”.
- ◆ Roberto Pigro, “Faŝismo kaj esperantismo en la jaroj de la Dua Mondmilito: ‘vojaĝo’ tra la skribitaj fontoj de la epoko (Italio, 1939–1945)”.
- ◆ Pascal Dubourg Glatigny, “Rememori la militon en Esperanto-literaturo: postmemoraĵa aliro preter nacioj”.

Partoprenis kiel publiko dudeko da homoj, ne malgranda kvanto, konsiderante, ke samtempe okazis ok sesioj. Ili faris multajn demandojn; evidentiĝis, ke granda parto de tio, kion ni rakontis, estas nova por ili. Jen normala situacio en tia granda kaj diversa konferenco, kie ĉiu prezento temas pri tre specifa temo, kaj geografie, kaj kronologie. Tiurilate nia sesio estis enhave unu el la plej koheraj. Pri nia rilato kun la ĉeestantoj, menciindas, ke kelkaj homoj daŭre alproksimiĝis al ni en malsamaj momentoj de la konferenco por pridiskuti plurajn aferojn.

La ideo kreiĝis en la kadro de la esplorprojekto *Militrakonto* [<https://mondmilito.hypotheses.org>]. Tiel, krom niaj individuaj prezentoj, ni ankaŭ preparolis ĝin. El tiu perspektivo, la konferenco utilis por videbligi Esperanton kiel normalan studobjekton. Nia opinio, tia agado ripetindas kaj subtenindas. Organizati tutan fakan sesion pri temo ligita al Esperanto en internacia konferenco signifas pli da laboro ol fari individuan kontribuon, sed la efiko ankaŭ multobliĝas.

Por ni estis aparte interese vidi, kiel aliaj temoj, kiuj antaŭ kelkaj jardekoj estis margenaj en la universitataj rondoj, nun fariĝis centraj, tute agnoskitaj de la fakuloj. Temas ekzemple pri samseksemulaj studoj aŭ judaj studoj. Ŝajnas, ke Esperanto-studoj ankoraŭ ne estas en tiu situacio. Ekzemple, neniam laŭ nia scio okazis pluraj sesioj pri Esperanto en tiaj konferencoj. Tamen, ni vidas pozitivan evoluon tiurilate; aliaj esplorprojektoj kreiĝas en pluraj fakoj de sociaj sciencoj kaj espereble oni fine atingos plenan rekonon.

Tial, ni multe pripensis tiun aferon kaj, cele al la obteno de lernindaj konkludoj, ni kritike taksis kaj analizis niajn prezentojn. Ĉu ni tro pasie prelegis, tiel ke ni ŝajnis nin pli aktivuloj

ol (neŭtralaj) esploristoj? Ĉu ni inkluzivis tro da informoj en la enhavo de niaj prezentoj? Ĉu la temo estis tro konkreta aŭ tro ĝenerala? Ĉu ni bone ekvilibrigis la teorion kun la empirio?

La respondoj al tiaj demandoj ne ĉiam klaras, sed la fakto, ke ni malferme starigis ilin, verŝajne indikas iom da necerteco niaflanke antaŭ la akademiaj fakuloj, kiu ne ĉiam sencas. Alivorte, eble tiujn dubojn niajn ne vere havis la ĉeestantoj en nia sesio. Kaj eble tiuj, kiuj verkis pri aliaj (similaj) temoj nun centraj, ne tiom pripensis prie. Sed verŝajne ili tion kutimis fari, kiam ili ankoraŭ verkis pri temoj (konsiderataj) margĝenaj...

En la kadro de *Militrakonto*, la konferenco utilis multflanke. Unue, ĝia preparado signifis kontakti aron da fakuloj, kiuj interesiĝas pri la temo, sed kiuj pro diversaj kialoj ĉi-foje ne sukcesis partopreni en Talino. Due, krom Dubourg-Glatigny kaj Alcalde, kiuj delonge esploras pri la Dua Mondmilito, la konferenco stimulis al la aliaj anoj de la teamo (Essertier kaj Pigo) verki pri tiu temo. Pigo estas lingvisto, kiu je la unua fojo kuraĝis pritrakti historian temon. Essertier estas literaturisto, kiu jam okupiĝis pri esperantaj aferoj, sed flanke de aliaj esploroj.

Krome, ni profitis la okazon por plurfoje kunveni, ni kvar, kaj pripensi estontajn vojojn de kunlaborado. Tiurilate fizikaj renkontoj necesas, kaj sendube bone funkciis ekkoni nin persone. Post la konferenco ni sekvis la babiladon rete.

Dum konkretiĝis la publikigado de la individuaj kontribuoj prezentitaj en Talino, alvenis ideo pri unu el la dimensioj de *Militrakonto*, nome la rilatoj inter Aziaj kaj Eŭropaj esperantistoj. El tiu perspektivo, ni decidis pretigi monpeton por la japana registaro (tiel nomatan KAKEN): *The Japanese Esperanto Movement's Interactions with Governments during the Wars of the 1930s and 1940s* ("La interagoj de la japana esperanto-movado kun registaroj en la militoj de la 1930-aj kaj 1940-aj jaroj"). La teamo de tiu ligata projekto konsistas el Essertier, Dubourg-Glatigny, Alcalde, Goro Christoph Kimura, Kadoja Hidenori kaj Gotelind Mueller-Saini. Ni scios la rezulton en aprilo 2020.

En novembro 2020, Alcalde kaj Dubourg-Glatigny partoprenis en Vieno fakan simpozion organizitan por honorigi la 90-jariĝon de la tiea muzeo de Esperanto kaj kolekto pri planlingvoj. En tiu kadro, Dubourg-Glatigny prezentis *Militrakonton* kaj ni ankaŭ klarigis niajn spertojn en Talino. Ĉi-foje la kvardeko da ĉeestantoj jam interesiĝis pri esperantaj temoj, kvankam ne nepre pri Esperanto kiel socia movado kaj pri ĝia socia historio. La debato tamen estis fruktodona kaj denove aperis pluraj proponoj por kunlaborado, kiuj indas esplori.

Estontece daŭros niaj klopodoj videbligi Esperanton kiel esplorobjekton. En februaro, aprilo kaj majo 2020, Alcalde prelegos en doktoriĝaj kursoj de la prestiĝa Lernejo por Altaj Studoj en Sociaj Sciencoj de Parizo (EHESS), interalie specife pri *Militrakonto*. Dume novaj kontribuantoj verkas slipojn por la retejo. Ĝis nun kontribuis Dubourg-Glatigny, Alcalde, Ulrich Lins, Catherine Goussef, Carlo Minnaja, Javier Guerrero, Esther Boquera, Carlo Minnaja, Fritz Wollenberg kaj Kadoja Hidenori (tiu lasta ankoraŭ ne publikigita).



Tamen, malgraŭ la ĝenerale pozitivaj demarŝoj de la projekto, indas rimarki, ke ĉiu nova paŝo kostas sufiĉe da penado. Tiel, Talino utilis, sed neniel mi volas doni la impreson, ke post nia partopreno en Talino ĉiu alia partoprenanto estas bone informita pri Esperanto kaj la Dua Mondmilito. Aliflanke, multaj homoj, kiuj promesis verki slipojn pri pluraj temoj por la retejo de *Militrakonto* ankoraŭ ne faris. Plej malkontentige estas la kazoj de Essertier kaj Pigro, kiuj jam profitis la malavarecon de ESF. Espereble ili tion faros baldaŭ.

Resume, kvankam ekzistas malfacilaĵoj kaj ne ĉiam ĉio iras glate, ni daŭre opinias, ke organizi sesiojn pri Esperantaj temoj en fakaj konferencoj efikas kaj estas sekvinda vojo. Tial mi sincere dankas al ESF, ĉar sen ĝia subteno ne eblintus nia partopreno en Talino.

*Javier Alcalde*

## Interlingvistika sesio kun instruista trejnado

14–20 septembro 2019

<https://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/index.html>

La 7-a grupo de interlingvistikaj studentoj atingis sian 3-an jaron en la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando).

10 partoprenantoj el 9 landoj (Francio, Rusio, Brazilo, Germanio, Usono, Sud-Koreio, Ĉinio, Hispanio kaj Pollando) povis specialiĝi pri instruado aŭ komunikado dum la sesio. Ĉi-lastan gvidis Iлона Koutny kun temoj pri internacia kaj interkultura komunikado instigante diskutojn en la grupo.

Kontribuis al la programo Barbara Pietrzak (Pollando) pri ĵurnalismo kaj radiofonio; Roman Dobrzyński (Pollando) pri filmarto, ankaŭ kun propraj filmoj prezentantaj esperantan kulturon el sia longa kariero; István Ertl (Luksemburgio) gvidis seminarion pri literaturo, Nicolau Dols (Hispanio) pri transmeto de literaturaj tekstoj, kaj Ida Stria (Pollando) pri internaciaj helplingvoj.

## 5-a Internacia Konferenco pri Aplika Lingvistiko

26–28 septembro 2019

<http://www.taikomojikalbota.flf.vu.lt/en/>

Tiu konferenco ĉe la Fakultato pri Filologio, Universitato de Vilno havis la titolon “Lingvoj kaj homoj: komunikiĝo en multlingva mondo”.

## 90-jara jubileo de la Esperanto-muzeo

24–25 oktobro 2019

Scienca simpozio pri la temo “Planlingvoj kaj lingvo-planado” okazis en la Aŭstria Nacia Biblioteko.

- ◆ Programo: [https://www.onb.ac.at/fileadmin/user\\_upload/5\\_NewsMashup/Veranstaltungen/ESP\\_Programm.pdf](https://www.onb.ac.at/fileadmin/user_upload/5_NewsMashup/Veranstaltungen/ESP_Programm.pdf)
- ◆ Resumoj: [https://www.onb.ac.at/fileadmin/user\\_upload/PDF\\_Download/ESP\\_abstracts.pdf](https://www.onb.ac.at/fileadmin/user_upload/PDF_Download/ESP_abstracts.pdf)

## Das Ende von Babel?

7 novembro 2019

<https://www.fu-berlin.de/sites/dhc/programme/termine/Podiumsdiskussion-Das-Ende-von-Babel.html>

Tiel (“La fino de Babelo?”) nomiĝis podia diskutado en la Libera Universitato (Freie Universität) de Berlino, kun partopreno de Federico Gobbo (Interlinguistik und Esperanto, Universitato de Amsterdamo), Barbara Seidlhofer (Englisch als Lingua franca, Amerikanistik und Anglistik, Universitato de Vieno) kaj Josef van Genabith (Multilinguale Technologien, Deutsches Forschungszentrum für Künstliche Intelligenz, Saarbrücken).

Jen artikolo de Roland Schnell pri la evento: <https://esperanto.berlin/science-en-fu>.

## Parolado de François Lo Jacomo ĉe Unesko

16 novembro 2019

Eblas rigardi tiun paroladon nome de UEA, okaze de la 40a Ĝenerala Konferenco de Unesko:

<https://www.esperantoporun.org/dokumentoj/videoj/parolado-de-francois-lo-jacomo-nome-de-uea-okaze-de-la-40a-general-a-konferenco-de-unesko-16-nov-2019/>

## Internacia konferenco en Perugia

26–27 novembro 2019

<https://www.unistrapg.it/en/1st-international-conference-peace-dialogues-nonviolence-sustainability>

Internacia konferenco “Pacdialogoj: de ne-perforto ĝis daŭripovo” okazis ĉe la Universitato por Fremdlandanoj de Perugia, Italio. Ĝi enhavis parton pri lingvoj de ne-perforto.

La retpaĝo parolas pri la verko *Elementi di un’esperienza religiosa* de Aldo Capitini. Ekzistas Esperanta traduko farita de Nicolino Rossi.

## Esperanto fariĝas protektita heredaĵo de Kroatio

16 decembro 2019

Kroata Esperanto-Ligo okaze de la 160-naskiĝtago de Zamenhof ricevis maloftan donacon: la tradicio de Esperanto estis deklarita nemateria kultura heredaĵo de Respubliko Kroatio.

Dum la festo oni prezentis video-materialojn pri la plej grandaj atingoj de esperantistoj en Kroatio dum la lastaj 111 jaroj. Enkonduke koncertis kantisto Neven Mrzlecki.

La festo okazis en la Pola Kultura Asocio Mikołaj Kopernik en Zagrebo (por informi polojn en Kroatio, ke ili havas la 5-an jubileon, ekde kiam Esperanto fariĝis protektita heredaĵo en Pollando).

Spomenka Štimec informas nin, ke tiun tagon la kroata televido filmis kun ŝi elsendon por la programo *Bonan matenon, Kroatio*. Enkonduke al la Zamenhof-tago, buso da ekskursantoj direktiĝis al Vieno la 14-an de decembro. Kelkaj el la vojaĝantoj planis ĉeesti la aŭstran Zamenhof-tagon ĉe la Pola Instituto en Vieno.

# LIBROJ

## Davide Astori, *Due passi in Esperantujo – Promenadeto en Esperantujo*

(Athenaeum, 2019)

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=2949>

Dulingva kun vidalvidaj respondaj tekstoj. 150 paĝoj (vidalvide egale numeritaj, do la papera konsisto estas el 300 paĝoj).

## Carlos Casares (trad. Suso Moinhos), *Vundita vento*



(Espero, 2019)


<https://katalogo.uea.org/?inf=4646>

Tio estas la Esperanto-traduko de la novelaro *Vento ferido* (1967). La libro estas aĉetebla, interalie, de Hispana Esperanto-Federacio (HEF) kaj UEA.

Oni jam alŝutis al la paĝaro de la Universitato de Vigo filmojn pri la prezentado de la Esperanto-traduko [<https://tv.uvigo.es/series/5b5b691e8f42080e7360fd95>], okazinta en la Fakultato pri Filologio kaj Tradukado de tiu universitato (17-an de oktobro 2019). La filmoj estas en la galega. Prezentas Luis Alonso Bacigalupe, dekanon de la Fakultato pri Filologio kaj Tradukado. Parolas, laŭvice:

- ◆ Håkan Casares Berg, filo de la aŭtoro, por la Fondaĵo Carlos Casares;
- ◆ Iolanda Galanes, profesorino de la Fakultato pri Filologio kaj Tradukado, membro de la esplorgrupo pri tradukado BITRAGA, Universitato de Vigo;
- ◆ Gustavo A. Garrido, sekretario de la Fondaĵo Carlos Casares;
- ◆ Jesús Moinhos Pardavila, instruisto kaj tradukinto de la verko.

## Bill Chapman, *The Early History of Esperanto in the United Kingdom*



*La frua historio de Esperanto en la Unuiĝinta Reĝlando*

(Coast & Country, 2019)

<https://katalogo.uea.org/?inf=3690>

Historio de la frua Esperanto-movado en Britio, dividita laŭ landopartoj kaj graflandoj, kun listoj de pioniroj.

## André Cherpillod, *Vortaro de la mitoj kaj mitologioj*

(La Blanchetière, 2019)

<https://katalogo.uea.org/?inf=1337>

Ordigita alfabete, kun indiko de la nomo/vorto en la origina lingvo.

## François Grin (red.), *Mobility and Inclusion in Multilingual Europe: The MIME Vademecum*

*Moviĝpovo kaj Inkluzivo en Multlingva Eŭropo: la MIME-manlibro*

(Geneva: The MIME Project, 2018)

<https://www.mime-project.org/vademecum/>

Ĉi tiu 190-paĝa manlibro, senpage disponebla kiel PDF ĉe la adreso ĉi-supre, estas praktika ilo, kiu rezultis de la projekto MIME (Moviĝemo kaj Inkluzivo en Multlingva Eŭropo) sponsorita de la Eŭropa Komisiono. Uzante freŝan aliron, kiu kombinas dek-unu diversajn fakojn, ĝi proponas novigeman kaj integritan respondon al lingvopolitikaj defioj kutime regardataj aparte. Ĝi celas homojn, kies profesiaj aŭ politikaj agadoj igas ilin konsideri problemojn de multlingvismo, fari opinion pri tiuj temoj kaj, rekte aŭ nerekte, formi lingvopolitikajn decidojn je niveloj loka, nacia aŭ supernacia.

La libro enhavas respondojn al 72 mallongajn ĉapitrojn de diversaj aŭtoroj ligitaj al la projekto, grupitajn sub la jenaj titoloj:

- ◆ Lingvopolitika analizo
- ◆ Malplimultoj, plimultoj kaj lingvaj rajtoj
- ◆ Lingva diverseco, moviĝpovo kaj integriĝo

- ◆ Lingva edukado, instruado kaj lernado
- ◆ Tradukado, lingvoteknologioj kaj alternativaj strategioj
- ◆ Apartaj temoj

Inter la temoj pritraktitaj: “Ĉu planlingvon kiel Esperanton oni diskonigu kiel internacian lingvafrankaon?”

## Norman Lebrecht, *Genius and Anxiety: How Jews Changed the World 1847–1947*

*Genio kaj maltrankvilo: Kiel judoj ŝanĝis la mondon 1847–1947*  
(Novjorko: Scribner, 2019)

La libro enhavas sekcion pri Zamenhof kaj Ben-Jehuda.

## Carlo Minnaja (red. Davide Astori), *Introduzione alla letteratura esperanto*



(Athenaeum, 2019)

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=6382>

250 paĝoj


## Gonçalo Neves, Bernhard Pabst, *Historia vortaro de Esperanto*

(MAS 2018)

<https://katalogo.uea.org/?inf=8757>

La verko celas dokumenti la plej fruajn uzon de ĉiu Esperanta radikoj, kunmetaĵoj kaj derivaĵoj.

Juan Régulo Pérez k.a., *Pri adopto kaj Omaĝo*



(Sociedad Esperantista de Tenerife, 2019)

<https://katalogo.uea.org/?inf=6310>

Traduko de parolado dirita okaze de la akceptado kiel adoptita filo de La Laguna, plus aldonaj tekstoj.


L. L. Zamenhof, *Gramatiko de la jida lingvo: Provo de gramatiko de la novjuda lingvo (de la ĵargono)*

(MAS, 2019)

<https://katalogo.uea.org/?inf=678>

Origine en la rusa, la verko havis la titolon, kiu por ĉi tiu eldono fariĝis subtitolo.

Sabine Fiedler, Cyril Robert Brosch, *Der Erasmus-Studienaufenthalt – Europäische Sprachenvielfalt oder Englisch als Lingua franca?*



(Leipziger Universitätsverlag, 2019)

<http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/Fiedler-Brosch-Erasmus.pdf>

Studo pri lingvouzo kaj lingvopraktikoj de Erasmus-studentoj, rete alirebla.

## Jarlibro 2019 de GIL

<http://www.interlinguistik-gil.de/wb/pages/tagungsakten/jgi-2019.php>

Sabine Fiedler informas nin pri la jarlibro 2019 de la Societo por Interlingvistiko (Gesellschaft für Interlinguistik, GIL). Ĝi enhavas germanlingvajn kontribuojn, resumitaj ĉi-sube:

### **Věra Barandovská-Frank, “La tutmondiĝo de la franca (de internacia lingvo al Franglais)”**

La Franca servis kiel “interlingua” jam tre frue. La unua internacia dokumento en la malnova franca estis kontrakto inter okcidentfranka reganto Karolo la Kalva kaj orientfranko Ludoviko la Germana el la jaro 842. Ekde la 12-a jarcento evoluis *le francien* al la franca lingvo (*langue française*), kiu ĝuis prestiĝon tra Eŭropo dum la Renaskiĝo (*première universalité*) kaj estis kodigita en 1660 per la fama *Grammaire de Port Royal*.

Evoluo de scienco kaj filozofio igis la francan en la 18-a kaj 19-a jarcentoj la internacia lingvo de aristokrateco kaj diplomatio, precipe en Rusio, Pollando kaj Germanio (*deuxième universalité*) kaj francaj esprimoj (ekz. *parapluie, plaisir, trottoir, portemonnaie, promenade*) iĝis popularaj tra Eŭropo.

Kiel *langue véhiculaire* de la kolonioj, la franca ekspansiigis tutmonde. La perdo de kolonioj kaj la kreskanta politika kaj ekonomia graveco de Usono en la 20-a jarcento malaltigis la prestiĝon de la franca. Nun la lingvo suferas influon de anglismoj, kvankam oni provas batali kontraŭ tio per leĝo (Loi Toubon, 1994). La nuna franca prezidanto ŝatas uzi la anglan en siaj paroladoj, kvankam tio ne necesas kaj interpretatas kiel signo de submetiĝo al tutmondiĝanta angla hegemonio.

### **Cyril Robert Brosch, “Kelkaj rimarkoj pri Esperanto kiel denaska lingvo”**

La artikolo en sia unua parto ebligas superrigardon de la aktualaj esploroj pri la tiel nomataj denaskuloj, t.e. homoj, kiuj kreskas aŭ kreskis kun Esperanto kiel unu el la gepatraj lingvoj. Tiukadre okazas ankaŭ meditoj pri la ĝenerala problemo de denaskaj lingvoj.

Ĉar multaj el la esplorstudoj celas antaŭ ĉio la soci- kaj psiko-lingvistikajn aspektojn de la t.n. artefarita plurlingveco, mankas detalaj prezentoj de la konkreta lingvoakiro. Tial la dua parto de la artikolo donas ekzemplon interalie de gramatikaj kaj leksikaj aspektoj de denaska akiro de Esperanto, surbaze de ampleksaj notoj faritaj dum kelkjara observado de du infanoj trilingvaj.

### **Goro Christoph Kimura, “Interlingvaj strategioj en komparo: ĝeneralaj karakterizaĵoj kaj german-polaj aplikaĵoj”**

Ĝisnunaj studoj pri diversaj ebloj de interlingva komunikado kutime elektis nur kelkajn el la eblaj rimedoj kaj ofte favoris iun specialan strategion, malalte taksante la aliajn. Ĉi tiu



artikolo intencas pritrakti ĉiujn strategiojn, kaj antaŭsupozas, ke ĉiu eblo havas proprajn avantaĝojn kaj malavantaĝojn, tiel ke neniu strategio taŭgas por ĉiuj celoj kaj situacioj.

La trajtoj de interlingva tradukado, interkompreniĝo inter rilataj lingvoj, interkomprena multlingveco, uzo de unu partnerlingvo, lingva interŝanĝo, angla kiel interlingvo, Esperanto, latina kaj lingvomiksado estas analizitaj. Fine, la konsideroj estas aplikitaj al la german-pola landlima regiono, kie plej diversaj strategioj estas uzataj por superi la lingvan baron.

### **Ilona Koutny, “Tutmondiĝo – internacia kulturo – internaciaj lingvoj”**

La tutteriĝo en la lastaj jardekoj ebligas senperajn kaj perajn kontaktojn inter diversnaciaj homoj. La kultura kaj lingva diverseco povas konduki ankaŭ al konfliktoj kaj ekskludo el la informoj de certa parto de la popolo. Lingvo estas parto de homa kapitalo; ĝia rolo estas grava en la egalranga kaj efika komunikado.

Post la difino de kulturo en vasta senco, ĝia rilato al lingvo kaj diskuto pri internacia kulturo kaj interkultura komunikado, la aŭtoro analizas du kazojn: unue, kiam la komunikado okazas en la gepatra lingvo de unu el la partneroj, kio kreas malegalecon lingvan, kulturan, psikologian kaj socian; due, la komunikadon per komuna lingvafrankao. Mallonge ŝi karakterizas la uzadon de la angla en tiu rolo.

La artikolo fokusiĝas al la komunikado per Esperanto kaj serĉas la spurojn de internacia, eŭropa kaj propra kulturoj, traktas la flekseblan strukturon de Esperanto kiel specifecon por la pli klaraj sinesprimo kaj kompreno, krome por transmeto de la propra kulturo de la parolanto. Ĝi prezentas ankaŭ la internacian parolkomunumon, kiun malgraŭ ĝia diverseco ligas komunaj ideoj, kiuj estas la bazo por egalrajta kaj solidara komunikado.

### **Michał Kozicki, “La influo de la angla al la kreado de neologismoj en la amhara lingvo”**

La amhara estas uzata kiel la oficiala lingvo en Etiopio. Ekde la fino de la Dua Mondmilito ĝi estas forte influata de la angla, kaj tiu ĉi tendenco estas ĝis nun videbla en la disvolviĝo de la lingvo.

La anglaj pruntvortoj povas esti adaptitaj al la amhara lingvo kun malmultaj fonetikaj modifoj, kio estas des pli videbla en la okazo de la neologismoj de la diversaj teknikaj domajnoj. Granda nombro da neologismoj povas esti kreita helpe de tiaj leksikaj procezoj kiel kunmetado, tondado, kreoligo, hibridigo, afiksado kaj tradukprunto. Se temas pri la adaptiĝo de multaj anglaj pruntvortoj, ĝi povas esti ofte problema pro la amhara skribsistemo kaj la diferencoj en la fonetismo. Ĉar mankas diftongoj en la amhara lingvo, iuj neologismoj estas grave deformitaj, pro kio estas malfacile ĝuste kompreni kelkajn pruntvortojn. Plej ofte la leksikaj strukturoj influitaj de la angla estas konstruitaj en la formo de la amhara aŭ malnovetiopia *status constructus*, sed estas ankaŭ multe da fakaj terminoj, kiuj povas esti adaptitaj al la amhara alimaniere.

## **Bernd Krause, “Esperanto kaj la Olimpikaj Ludoj – Aspektoj de kontakto”**

Sporto kaj lingvo(j) havas diversajn punktojn de renkontiĝo, precipe ĉe internaciaj eventoj. Tiu kontribuo ekzamenas, kie, kiam kaj kiamaniere Esperanto povis lasi spurojn en la kampo de Olimpi(k)a sporto. Rilate al la modernaj Olimpikaj Ludoj iniciatitaj de Barono de Coubertin en la jaro 1896, nur ekzistas malprofundaj kontaktoj. La vendado de serio de poŝtmarkoj sur aparta folio, okazante antaŭ la Olimpika Stadiono de Amsterdamo en 1928, estis kvazaŭ kulmino.

Spite de diversaj publikaj diskutoj pri la verŝajne pozitivaj efikoj rezultantaj el la uzado de la internacia lingvo, Esperanto neniam trovis sian vojon en sporton mem. Ĉar la Olimpika Komitato ĉiam persistis pri la uzado de la angla kaj la franca kiel oficialaj lingvoj, fiaskis klopodoj establi Esperanton kiel internacian Olimpikan lingvon. Almenaŭ en 2008 kvarlingva *Manlibro pri Olimpikaj Vortoj* aperis, kaj unu el la lingvoj estis Esperanto.

En laborista sporto, precipe en la Internaciaj Laboristaj Olimpiadoj aranĝitaj inter la Mondaj Militoj, Esperanto havis nekompareble pli grandan sukceson – spite de la fakto, ke la tuta laborista movado estis dividita en du malamikajn frontojn: dum la socialista Olimpiado de 1931 en Vieno, Esperanto estis uzata kiel oficiala lingvo – buŝe kaj skribe – kaj dum la komunista Spartakiado planita por 1933 en Moskvo, Esperanto estis uzota eĉ por startigaj komandoj. Tiu estus unu el la plej grandaj “sportaj” momentoj en la historio de Esperanto, sed ĝi neniam okazis, ĉar la evento devis esti nuligita.

## **Kristin Tytgat, “Esperanto kaj tutmondiĝo: Kiel planlingvo kiel Esperanto traktas neologismojn?”**

En la tempo de tutmondiĝo multaj neologismoj naskiĝas en la angla lingvo kaj trovas sian vojon al aliaj lingvoj. En tiu ĉi artikolo la aŭtoro klopodas esplori, kiuj meĥanismoj funkcias por la traduko de neologismoj ĝenerale, kaj kiamaniere Esperanto trovas solvon por traduki tiujn novajn vortojn. Tiucele kelkaj tekstoj el la *Unesko-Kuriero* de julio–septembro 2017 estas analizitaj en la angla kaj en la Esperanto-traduko. Montriĝas, ke Esperanto kapablas traduki la anglajn neologismojn, kaj tiel ĝi respondas al la postuloj de moderna planlingvo.

### *Esperantigo de **Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese***

<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=9460>

Carlo Minnaja informas nin, ke laŭ diro de Irene Caligaris, eta teamo nun esperantigas ŝian libron *Una lingua per tutti, una lingua di nessun paese* (Aracne, 2016).

## *La gastlibro de Casa Fontanalba, de Clarence Bicknell*



<https://www.clarencebicknell.com/en/2-non-categorise/184-buy-the-casa-fontanalba-visitors-book>

Clarence Bicknell estis brita pastro, kiu loĝis en Italio dum preskaŭ 40 jaroj; li estis unu el la fondintoj de la itala Esperanto-movado. Tiu ĉi 52-paĝa tutkolora bindita libro, eldonita en 2017 de la Asocio Clarence Bicknell kaj Troubador, reproduktas la subskribojn de vizitantoj maldekstre kaj la botanikajn desegnaĵojn de Bicknell dekstre.

La prezon oni draste malpliigis de GBP 33.50 ĝis GBP 18.95 plus afranko.

Pli da Bicknell-aj eroj vendiĝas ĉe <https://www.clarencebicknell.com/en/shop>.

# ARTIKOLOJ

## Eckhard Bick, “Aŭtomataj generado kaj semantika gradigo de Esperanto-frazoj en instruada kunteksto”

“Automatic Generation and Semantic Grading of Esperanto Sentences in a Teaching Context”  
en *Proceedings of the 8th Workshop on NLP for Computer Assisted Language Learning*  
(2019, red. David Alfter, Elena Volodina, Lars Borin, Ildikó Pilsan, Herbert Lange)  
<https://www.aclweb.org/anthology/W19-6302.pdf>

Metodo por la aŭtomataj generado kaj semantika taksado de ekzercaj frazoj por la instruado de Esperanto.

## Renato Corsetti, “UN 75-jariĝas: Esperanto bezonas Unuiĝintajn Naciojn, sed Unuiĝintaj Nacioj bezonas esperantistojn”

en la UEA-revuo *Esperanto* (decembro 2019)  
<https://revuoesperanto.org/oon>

## Nino Kirvalidze, “Novaj defioj de angliĝo en la kunteksto de la tutmondiĝo de la 21-a jarcento kaj ilia influo al supera edukado”

“New challenges of anglicisation in the context of 21st-century globalization and their impact on higher education”  
(2019) en *Studies in Literature and Language* (19/2, p.1–8).

Ĉi tiu referaĵo juĝas, ke la angliĝa fenomeno estas antaŭdeterminita:

- ◆ de la multflanka influo de Usono al multaj landoj;
- ◆ de la evidenta bezono de unuigo kaj normigo de terminologiaj kaj aliaj tavoloj de leksiko rilate al diversaj aspektoj de homaj agadoj;
- ◆ de la prestiĝa rolo de la angla kiel lingvafrankao en internacia kunlaboro inter landoj.

Malsamas la sintenoj pri la angliĝa procezo. Kvankam kelkaj ŝatas ĝiajn politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn avantaĝojn, aliaj avertas kontraŭ tutmonde reganta lingvo, kiu eble sorbus malgrandajn kulturojn.

## Brigid O’Keeffe, “Internacia lingvo por imperio de la homaro: L. L. Zamenhof kaj la imperiaj rusaj originoj de Esperanto”

“An International Language for an Empire of Humanity: L. L. Zamenhof and the Imperial Russian Origins of Esperanto”

(2019) en *East European Jewish Affairs* (49:1, p.1–19)

<https://doi.org/10.1080/13501674.2019.1618165>

Ĉi tiu artikolo emfazas la imperiajn rusajn originojn de Esperanto kiel nepran kadron por kompreni la pli grandan historion de Esperanto kaj ĝia kreinto, L. L. Zamenhof (1859–1917).

Malgraŭ la tutmonda populareco de Esperanto en la frua dudeka jarcento, historiistoj malmulte esploris la historion de ĉi tiu internacia helplingvo kaj la utopiaj filozofiaj principoj, kiujn Zamenhof investis en la misio de Esperanto por transformi judojn, Rusion kaj la mondon. Sed kleruloj lastatempe rekonsideris Zamenhof kiel politikan aganton, kiu lanĉis Esperanton en 1887 kiel rimedon por solvi la Judan Demandon. Konstruante sur ilia laboro, ĉi tiu artikolo integras la historion de Esperanto en la historion de malfrua imperia Rusio.

La streĉa politika kulturo de la malfrua rusa imperio inspiris diversajn radikalajn, utopiajn, ideologiajn movadojn, kaj oni kalkulu Esperanton inter ili. Zamenhof proponis Esperanton kiel programon por unuigi ĉiujn la popolojn de la mondo en moralan komunumon de mond-civitanoj kunligitaj per komuna internacia helplingvo kaj universalisma etiko. Koncipita en la multetnaj limlandoj de rusa imperio, kiu laŭ lia sento malplenumis la esperojn de li kaj liaj judaj kunuloj, Esperanto estis la utopia vizio de Zamenhof per harmonia imperio de la homaro.

## Alexander Rubel, “Quo vadis Altertumswissenschaft? La rego de fremdaj lingvoj kaj la estonteco de klasikaj studoj”

“Quo Vadis Altertumswissenschaft? The Command of Foreign Languages and the Future of Classical Studies”

(2019) en *Classical World* (112/3, p.193–223)

Ĉi tiu referaĵo diskutas la demandojn, ĉu, pro la “internaciigo” de scienco, studentoj de la plejlarĝasencaj klasikaĵoj, jam delonge multlingvaj, devas nun en la 21-a jarcento verki en la angla, kvankam ne ĉiuj el ni povas sufiĉe bone esprimi niajn pensojn en la lingvo de Ŝekspiro.

Por esti entute rimarkita en la anglo-usona mondo, sciencaj eldonaĵoj pliiĝe devas aperi en la angla, senkonsidere la lingvokapablon de la aŭtoroj. Denaskaj angleparolantoj, aliflanke, ne plu opinias necese legi en aliaj lingvoj, kaj ili tial riskas reinventi la radon.

Krome, kritiko direktiĝas al naciaj esplorpolitikoj en eŭropaj landoj, kiuj senzorge forlasas la proprajn lingvojn favore al la reganta lingvo (ne ĉiam tute ĝuste uzata). Ĉi tiu referaĵo argumentas favore al multlingvismo.

# DISERTACIOJ

Peter Sheehy, *La (trans)nacia teatro de Esperanto: surscenigi politikon, kulturon kaj komunumon en la internacia lingvo*

*The (Trans)National Theatre of Esperanto: Staging politics, culture and community in the international language*

Magistra disertacio pri dramaturgio, Nacia Universitato de Irlando, Galivo (2019)

Peter skribas:

“Mi felicias anonci, ke ĝi gajnis unuaklasan honoron kaj havis la plej altan gradon en mia magistriĝa programo. Komentoj kaj kritikoj estas multe bonvenaj, ĉar mi intencas daŭrigi, kaj tial rafini, ĉi tiujn esplorojn.

Mi volas diri dankon denove pro la helpo, ke mi realigu ĉi tiun disertacion, kaj pro ĉiu la grava laboro, kiun faras Esperantic Studies Foundation.”

## Literatura disertacio en la keĉua

<https://globalvoices.org/2019/11/02/for-the-first-time-ever-a-doctoral-dissertation-was-defended-in-the-quechua-language-in-peru/>

En historie monumenta okazaĵo por Peruo, oni akceptigis disertacion en la indiĝena keĉua lingvo je la tutunua fojo. Roxana Quispe Collante ricevis la gradon 20 (bonega), gajnante sian doktoriĝan diplomon pri perua kaj latinamerika literaturo de la Nacia Universitato de San Marcos (UNMSM).

Ŝiaj esploroj, titolita “*Yawar Para*, Kilku Warak’aq, Andrés Alencastre Gutiérrezpa harawin pachapi, Qosqomanta runasimipi harawi t’ikrachisqa, ch’ullanchasqa kayninpi” (“Sangopluvo, transfigurado kaj unikeco en la keĉua poezia mondo de kuskaj *harawi*-oj de Andrés Alencastre Gutiérrez / Kilku Warak’aq”), celis agnoski la literaturan valoron de la anda poeto kaj reinterpreti lian poemaron *Yawar Para*, sed ankaŭ vigligi la keĉuan, fortigi ĝin, kaj liberigi ĝin de lingva kaj kultura antaŭjuĝo.

# DIVERSAJ

## Kial subteni ESF?

<https://www.youtube.com/watch?v=OapOh3pc70I>

En ĉi tiu mallonga filmeto, Mark Fettes parolas pri Esperantic Studies Foundation (ESF) kaj kial vi subtenu la unikajn projektojn, kiujn ĝi entreprenas pri lingvoplanado, lingvaj rajtoj, interlingvistiko kaj la instruado de Esperanto.

## Stipendio ESF ĉe la Universitato de Masaĉuseco

<http://scua.library.umass.edu/umarmot/services-at-scua/awards-and-prizes/fellowship-application-2020>

La Stipendio Esperantic Studies Foundation subtenas esplorojn de la enhavo de la Specialaj Kolektoj kaj Universitataj Arkivoj (SCUA) ĉe la Universitato de Masaĉuseco, Usono pri la historio kaj kulturo de planlingvoj, kun forta emfazo pri Esperanto kaj la esperanta movado. Ĉe SCUA loĝas granda kaj kreskanta kolekto da materialo dokumenta pri esperanta kulturo, inkluzive de la kronikoj de la Esperanta Informcentro, la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko, la Paperoj de Lewis Cook, kaj la Esperanta Libro-Kolekto de Allan Boschen. Stipendiitoj ricevas subvencion de \$2500 kun aldona porvojaĝa monsumo kaj oni atendas, ke ili rezidu entute unu monaton en la daŭro de la stipendia jaro.

### Rajtas kandidatiĝi

Postdiplomaj studentoj kaj frukarieraj profesiuloj (doktoriĝintaj antaŭ malpli ol kvin jaroj).

### Kandidatiĝo

SCUA uzas la saman kandidatiĝan procezon por ĉiuj stipendiaj programoj, kaj akceptas nur retajn aliĝojn. La kompleta pako de kandidato enhavos:

- ◆ Konkizan biografian deklaron de ne pli ol 350 vortoj kun priskribo de via pli granda esplorplano uzota cele al publika diskonigo.
- ◆ Superrigardon de la proponita projekto, kiu ne okupu pli ol tri paĝojn.
- ◆ Aktualan vivprotokolon aŭ karieresumon.
- ◆ Unu konfidencan referencleteron.

La reta kandidatiĝilo funkcias kaj disponeblas ĉe la adreso ĉi-supre. Aliĝojn oni atendas ĝis 6 marto 2020 kaj aljuĝojn oni anoncos je aŭ antaŭ 1 aprilo 2020.

Bonvolu kontakti SCUA ([scua@library.umass.edu](mailto:scua@library.umass.edu)) kun eventualaj demandoj.

## Esperanto kaj Internaciismo, ĉ. 1880-aj – 1930

Esperanto and Internationalism, c.1880s–1930

<https://standrewstransnational.wp.st-andrews.ac.uk/research/esperanto-and-internationalism-c-1880s-1930/>

Nova projekto de la Instituto por Transnacia kaj Spaca Historio ĉe la Universitato St. Andrews, Skotlando.

## Je la 70-jariĝo de ILEI

<https://edukado.net/novajhoj?id=802>

Se vi instruas Esperanton aŭ gvidas grupon certe estus interese por vi membriĝi al ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu ĵus festis sian 70-jaran datrevenon. La Ligo klopodas lertigi geinstruistojn kaj subteni instruantojn, kaj havas tre bonan kunlaborrilaton kun Edukado.net. ILEI havas revuon, kiu nomiĝas *IPR (Internacia Pedagogia Revuo)*, kies jubilea numero nun estas libere elŝutebla.

## Finance subtenata doktoriĝo (Ph.D.) en la Universitato de Ulstero, Nordirlando: La plurlingva registaro

Limdato por sinpropono: 7 februaro 2020

<https://www.ulster.ac.uk/doctorscollege/find-a-phd/511400>

La Doktorkolegio de Ulstera Universitato ofertas doktoriĝan postenon ĉe la Fako de Aplikaj Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. La doktoriĝa studento laboros sub la gvidon de D-ro Michele Gazzola pri la temo “La plurlingva registaro”. Ĉi tio estas interdisciplina projekto ĉe la interfaco inter studoj pri publika politiko, sociolingvistiko kaj ekonomiko. Kandidatoj estas bonvenaj el iu el tiuj esplorkampoj.

## Muzeo Planet Word

<https://www.planetwordmuseum.org/>

Jam survojas klopodoj por establi lingvomuzeon en Vaŝingtono, estrata de kelkaj bone konataj personoj en la lingvistika mondo (Pinker, Crystal, Wolfram, ktp).

## Mapo pri lingva diverseco en Novjorko

<https://gothamist.com/news/dazzling-map-shows-nycs-incredible-linguistic-diversity>

Priskribita kiel unua paŝo por helpi konservi endanĝeritajn dialektojn kaj lingvojn.



## Graveco de Esperanto-denaskuloj por la priskribo de Esperanto

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Denaskaj\\_Esperanto-parolantoj#Literaturo\\_pri\\_denaskuloj\\_\(inkl.\\_de\\_scienca\)](https://eo.wikipedia.org/wiki/Denaskaj_Esperanto-parolantoj#Literaturo_pri_denaskuloj_(inkl._de_scienca))

Lu Wunsch-Rolshoven informas nin, ke ĉe la ĉi-supra adreso li kolektis literaturon pri Esperanto-denaskuloj, ĉefe sciencajn artikolojn. Li petas, ke aliaj aldonu al ĝi – aŭ informi lin, por ke li aldonu.

Lu daŭrigas:

“Ŝajnas al mi, ke la ekzisto de milo da denaskuloj estas grava kriterio por multaj lingvistoj ne parolantaj Esperanton, kiam ili priskribas Esperanton. Ofte la klasifiko estas iom simpla: lingvo sen denaskuloj estas morta; kun (grandeta nombro de) denaskuloj ĝi estas vivanta lingvo. Certe ekzistas multaj argumentoj por aserti, ke en la kazo de la planita lingvo Esperanto jam sen konsidero de la denaskuloj indas konstati, ke ĝi estas vivanta lingvo. Tamen laŭ la spertoj de multaj homoj la argumentado por Esperanto kiel vivanta lingvo iĝas konsiderinde pli facila, se oni mencias la denaskulojn.

Sekve mi instigas, ke ĉe la prezento de Esperanto ni eksplicite menciu ankaŭ la ekziston de la Esperanto-denaskularo. Temas laŭ mi pri unu el la ecoj de Esperanto kaj de ties lingvo-komunumo, kiun ni ne nur flanke prezentu.

[https://eo.wikipedia.org/wiki/Denaskaj\\_Esperanto-parolantoj#Esperanto-denaskularo\\_kaj\\_Esperanto\\_kiel\\_%22vivanta\\_lingvo%22](https://eo.wikipedia.org/wiki/Denaskaj_Esperanto-parolantoj#Esperanto-denaskularo_kaj_Esperanto_kiel_%22vivanta_lingvo%22)

Volonte mi legos aliajn argumentojn pri tio.”

### Korekto pri “Aliro al Esperanto tra la literaturo”

En la antaŭa numero de *IpI* (4/2019, p.5), ni inkluzivis la artikolon “Aliro al Esperanto tra la literaturo” de Carlo Minnaja en la listo de “ŝajne nepublikigitaj studoj lastatempe aldonitaj al *academia.edu*”. Tiu artikolo fakte aperis en 2018 en *Aliroj al Esperanto* (red. Christer Kiselman) ĉe Kava-Pech.

# STIPENDIOJ DE ESF

Esperantic Studies Foundation havas du subvenciajn programojn: unu por Interlingvistika Subteno kaj alia por Ĝenerala Subteno.

## Programo por Interlingvistika Subteno (IS)

Tio estas administrata de internacia komisiono sub aŭspicio de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED). Ĝi aljuĝas malgrandajn subvenciojn, kutime malpli ol 2000 usonaj dolaroj, por helpi fakulojn kaj jam spertajn studentojn plenumi esplorojn en la fakoj lingvoplanado, interlingvistiko, transnacia lingva politiko, lingva justeco, kaj planlingvoj (inkluzive Esperanton). La subvencioj povas subteni aĉeton de (aŭ aliron al) esploraj materialoj, partoprenon en konferencoj, vojaĝadon al esplorbibliotekoj, subtenon de surkampa laboro, evoluigon de retejoj, kostojn de publikigo, k.s. Subvencioj IS estas aljuĝataj konkurse kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo de la subvencio.

## Programo por Ĝenerala Subteno (ĜS)

Tio kovras ĉiujn tri aktualajn prioritatojn de ESF: Esploradon, Edukadon kaj Konservadon. Ĝi estas malferma al individuoj kaj organizaĵoj, inkluzive de universitatoj. Subvenciojn oni aljuĝas konkurse. Kvankam plej multaj subvencioj estas malgrandaj kaj kutime devas esti uzataj ene de unu jaro post ricevo, foje subvencioj estas aljuĝataj por pli longaj periodoj kaj en pli grandaj sumoj. Antaŭ ol peti subtenon, estas konsilinde sendi mallongan mesaĝon al [admin@esperantic.org](mailto:admin@esperantic.org), por demandi ĉu la propono taŭgas. Petoj ĜS estas traktataj de subkomitato de la Estraro de ESF. Petoj ĜS, kiuj tamen kongruas kun la gvidlinioj IS, estos plusendataj al la Komisiono IS.

## Limdatoj

Ekzistas tri limdatoj ĉiujare por subvencipetoj, en ambaŭ ĉi-supraj programoj:

- ◆ 31 januaro
- ◆ 30 aprilo
- ◆ 30 septembro

Por pli da informoj, bonvolu viziti: <https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/stipendioj-de-esf>

*IþI* estas eldonaĵo de Esperantic Studies Foundation (ESF) en la nomo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191. Paralela anglalingva versio, *Information for Interlinguists (IfI)* estas ankaŭ disponebla. Ĉi tiun numeron redaktis Simon Davies kun helpo de Angela Tellier. Por ricevi avizojn pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al [ipi@esperantic.org](mailto:ipi@esperantic.org). Limdato por la venonta numero: 31 marto 2020. Kontribuadoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ la angla, aŭ ideale kiel la saman tekston tradukitan en ambaŭ lingvoj. ESF en la reto: <https://www.esperantic.org>, <https://www.facebook.com/esperantic>. Tvitero: @esperanticsf, @esfacademic.